

## Poŝtkarto el la genra tranĉeo: Kio okazis al niaj verkistinoj?

Vilmos Benczik (1979) en la enkonduko al *Baza literatura krestomatia* diras, ke “kono de la propraj valoroj estas gravega kohezia [t.e., kohera] forto en ĉiu kultura komunumo”. Por Mauro Nervi (2008), aliflanke, “la literatura memoro estas la kerno de kulturo”. El tiuj asertoj eblas konkludi, ke la kono de literatura memoro estas esenca en ajna kulturo. Kaj kvankam tio valoras por ĉiuj komunumoj, en la esperanta, sena je aliaj ecoj kutime kontribuantaj al la formiĝo de kultura identeco (religio, folkloro, aliaj artoj, laboro, k.a.), ĝi ricevas apartan reliefon.

Tamen ne ĉiam facilas bone konservi la literaturan memoron. Unu el la faktoroj agantaj en tiu senco estas la diseco de la esperanta parolant-komunumo. La manko de oficiala subteno (oni ne lernas la esperantan literaturon en lernejoj, mankas eventoj apogataj de registaro) kaj la neekzisto de efikaj iniciatoj celantaj la esploron, valorigon kaj diskonigon de nia literatura havaĵo, certe kontribuas al tio. Aliflanke, ajna teoriado pri ĝi devas ligiĝi kun la situacio de diasporaj socioj (kaj tradicie disaj kaj nuntempe migrantaj) kaj konsideri ankaŭ la soci-klasajn kaj genrajn diferencojn, kiuj estas propraj al la hodiaŭaj homgrupoj (De Mesquita Silva 2010).

El tia vidpunkto, la verkistinoj en la esperanta beletro elstaras en kunteksto formita de viraj voĉoj. Ekde la dua duono de la pasinta jarcento virinoj lokiĝas en la centro de siaj rezonadoj, pilotas siajn proprajn historiojn kaj rakontojn. La ina figuro ĝis tiam aperis samtempe kiel objekto de la revoj de viroj kaj motoro de ilia kreivo; bone konataj ekzemploj estas la *Sekretaj sonetoj* de Peter Peneter aŭ la poemoj de Auld, ambaŭ literaturaj modeloj kun granda influo. Tamen nun virinoj prenas la konduk-rimenojn de produktado de sencoj, kiun proprigis la patriarkeco reganta nian literaturan tradicion (Colaizzi 1990). Modelan rolon ludis sendube la figuro de Marjorie Boulton, per sia multĝenra breĉo en la literaturo el sia privilegia situo: en flua kaj fruktodona kontakto kun la skota skolo.

En la transiro al la nuna epoko, kie virinoj senbare produktas bonkvalitajn verkojn, kun ĝenerale bona ricevo (Anna Löwenstein, Anneke Buys, la karmemora Lena Karpunina) notindas fenomeno ankaŭ konstatebla en aliaj literaturoj. Temas pri tio, kion Vilavedra (2007) nomas la *okazo-kaptilo*: kelkaj verkistinoj publikigis unu, maksimume du verkojn, kaj poste forlasis la produktadon en Esperanto, plurfoje ankaŭ la Esperanto-movadon. Escepto al tiu ĉi fenomeno estas, inter aliaj, la elstara figuro de Spomenka Ŝtimec.

En tia kunteksto, en kiu la geografia diseco de la parolantaro helpas al malapero de promesplenaj verkistinoj, trudiĝas tio, kion Dufour-Maître (2011) nomas "arkeologio de la rezonadoj" (*archéologie des discours*), necesa por remalkovri kaj reskribi nian literaturan historion. Du el la verkistinoj, kiujn mi esploras, estas duoble periferiaj: ne nur genre sed ankaŭ

geografie, situantaj ekster la literaturaj centroj de siaj koncernaj produktad-epokoj<sup>1</sup>.

### Despina Patrinu (1930—1993)

Despina Patrinu (Δέσποινα Πατρινού) estas la sola verkisto el Grekio aperinta en *Esperanta antologio. Poemoj 1887-1981*. Ŝia kontribuo estis la poemo "Abelo kisis min", versaĵo kun kelkaj formaj kaj koheraj problemoj, sed impresanta per klasik-helenaj temoj (paseroj, abeloj), rondeco per repreno de kerna elemento en la fino, kaj mencio de ordinaraj objektoj kaj perdo-doloro, kio efikas, kvazaŭ estus manko de ajna afekto.

Despina akiris ian famon en la greka literaturo per la romano *Δανάη Βράιλα (Danáï Vráila)*, 1953). En 1954 ĝi estis selektita, kune kun aliaj naŭ verkoj, kiel finalistino de la premio "La Dek Du"<sup>2</sup>, organizita de la samnoma grupo (Ομάδας των Δώδεκα, Omádas ton Dódeka) (Vasilikos 2011). La libron sekvis plia romano en la greka: *Ρέα (Réa)*, 1955 kaj, post preskaŭ dudek jaroj, *Ένας Θεός κι ένας Άνθρωπος (Énas theós ki énas ánthropos, Dio kaj homo, rakontoj, 1973)*, *Παιδιά του Σηθ και του Κάιν (Pediá tou Seth kai tou Káin, La filoj de Seto kaj Kaino, 1977)*, *Στη θύελλα (Sti thýella, En la tempesto, romano, 1980)*, *Η ζαφειρένια κούπα (I zafirénia kóupa, La safira pokalo, rakontoj, 1985)* kaj *Η πεσούσα δρύς (I pesóusa drýs, La falinta kverko, 1986)*. Neniu el ili atingis vastan publikan akcepton, tamen ili estis bone ricevitaj de la kritiko. Ekzemple, Angelos Fouriotis (1978), parolante pri *Pediá tou Seth kai tou Káin*, mencias la majstran lertecon de Patrinu por proksimigi la leganton al la rakonto: "La sukceso de la aŭtorino ne estas koncepti tion, kion ŝi vidas, sed projekcii ĝin. Patrinu ja mastras la arton de siaj projekcioj"<sup>3</sup>.

Ŝi lernis Esperanton en 1975, la jaron antaŭ la 61-a Universala Kongreso en Ateno. Laŭ Spiros Sarafian<sup>4</sup> plej probable ŝi estis membro de malgranda E-grupo, kies gvidanto kaj E-instruisto estis Sokratis Sakellaropoulos<sup>5</sup>. Ŝi membris en UEA en la periodo 1977-1981, registrita kiel Despina Patrinou Papageorgiou, kun la noto: "Patrinu: aŭtonomo"<sup>6</sup>. Tamen ŝi ne aliĝis al Helena Esperanto-Asocio nek partoprenis ties agadon. Hodiaŭ pro ŝia apartiĝo disde la loka movado nur svagaj rememoraĵoj restas de ŝi inter la plej aĝaj grekaj esperantistoj, kaj jam de jardekoj oni ne aŭdas ŝian nomon. Ŝia vivo restis mistero ankaŭ por literatur-historiistoj: nek Pleadin (2006: 183) nek Minnaja kaj Silfer (2015: 437) scias, ke ŝi forpasis, kaj Sutton (2008) ne mencias ŝin nek la recenzon, kiun Conterno Guglielminetti (1977) publikigis en *Literatura Foiro*.

---

<sup>1</sup> Nur pri Sara Larbar oni ne povas tiel paroli, ĉar en Brazilo ekzistis literatura kreado, kun verkistoj kiel Chaves, Mattos kaj Passos Nogueira, kvankam ĉi lasta ne plu aktivis en la 80aj.

<sup>2</sup> Temis pri la unuaj postmilitaj literaturaj premioj en Grekio. Ili daŭris de 1951 ĝis 1966, kiam ili haltis pro la diktaturo. En 1954 venkis *Επιστροφή, Epistrofí*, de Galatias Sarandi. La nomo *Grupo de la Dek du* aludas ĝiajn dek du membrojn: Alkis Thrylos, Kostas Ouranis, I. M. Panagiotopoulos, Mich. D. Stasinopoulos, Stelios Xefloudas, Giannis Chatzimis, Petros Charis, Ilias Venezis, Giorgos Theotokas, Angelos Terzakis, M. Karagatsis kaj Tasos Athanasiadis. En 1954 Terzakis kaj Karagatsis forlasis la grupon kaj ne estis anstataŭitaj.

<sup>3</sup> Originale en la greka.

<sup>4</sup> El interparolo kun li.

<sup>5</sup> Sokratis Sakellaropoulos aŭtoris plurajn librojn: *Greka metodo de la internacia lingvo Esperanto* (1961), *I diethnís glóssa Esperanto (La internacia lingvo Esperanto, 1965)*, *La simpozio (bankedo) de Platon. Nova eldono reviziita* (1967), *La telepatio kaj ĝia socia signifo* (1968), *Sýntomos méthodos tis diethnós glóssis Esperanto choris dáskalo (Konciza metodo de la internacia lingvo Esperanto sen instruisto, 1970)*, *Greka - Esperanto vortaro* (1971), *La telepatio kaj ĝia kulpo en la homaj rilatoj* (1978, 2a eldono).

<sup>6</sup> Laŭ informo de la CO de UEA.

Despina Magdalenou-Papagiorgiou (Δέσποινα Μαγδαλένου-Παραγεωργίου) naskiĝis en Patra, kaj ŝi adoptis pseŭdonimon kun la signifo "el Patra" (Patrinou aŭ Patrinu, kiu cetere ekzistas kiel efektiva familia nomo). Andrikopoulos (1992) konsideras Despina-n unu el la tri "prozistinoj de Patra", kune kun Sophia Klimi-Papagiopoulou kaj Galatea Sarantis. Li (1993) verkis ŝian nekrologon.

Al nia literaturo Despina kontribuis ĉefe kiel tradukinto de siaj propraj greklingvaj verkoj. En 1976 ŝi debutis en Esperanto per la novelkolekto *Homa animo*. Sokratis Sakellaropoulos verkis la postparolon, aperintan sur la malantaŭa kovrilpaĝo. Liaj vortoj plifortigas la tezon de Sarafian:

La nuna volumo enhavas rakontojn el kiuj parto estas verkita kaj publikigita greklingve, parto estas verkita rekte en Esperanto, kiun ŝi multe aprezis kaj studis diligente, tiel, ke ŝi kuraĝis verki en ĝi. Kaj kiel oni konstato, ŝi ne malpravus, malgraŭ ke ŝi nur lastatempe eklernis la internacian lingvon. Ŝi preskaŭ prezentis seneraran tekston, apenaŭ tuŝitan de sperta E-isto.

Bedaŭrinde en la libro mankas indikoj pri la originala aŭ tradukita karaktero de ties sep rakontoj. Tamen Despina abunde publikigis tradukojn kaj proprajn verkojn en la greklingva literatura revuo *Néa Estia* (*Nea Estia, Nova Hejmo*), en du periodoj: en 1953-54 kaj 1972-1990. Kontrastado de tiuj kontribuoj kun la eroj de *Homa animo* ebligas al ni konkludi, ke almenaŭ la jenaj rakontoj estas elgrekigoj: "Tereza" ("Τερέζα", en *Nea Estia*, n° 638, de la 1a de februaro 1954) kaj "Survoje al Katmantu" ("Στο δρόμο για το Κατμαντού, Sto dromo gia to Katmandou" en *Nea Estia*, n° 1070, de la 1a de februaro 1972). Ankaŭ la rakonto "Unu dio kaj unu homo" estis originale en la greka; ĝi aperis en la menciita samnoma rakontaro en 1973. Do la libro enhavas rakontojn el ŝiaj du verkoperiodoj.

Sed la tekstoj publikigitaj en *Nea Estia* ankoraŭ ĵetas lumon sur la literaturaj interesiĝoj de Déspina. Ŝi tradukas Jean Richepin, Marceline Desbordes-Valmore kaj Karel Čapek. En la numero 1296 (de la 1<sup>a</sup> de julio 1981) ŝi aperigas tradukon de konataj versoj de la kroata poetino Vesna Parun (1922-2000): "Συ που έχεις χέρια, Si pou écheis chéria", per francigo de Roger Imbert, franca esperantisto loĝanta en Kroatio. Probable estis kontakto inter ili, kaj ŝi konis la esperantigon de Imbert "Vi, kies manoj", aperinta en *Heroldo de Esperanto* en 1964.

En 1979, dudek ses jarojn post la publikigo en la greka, surmerktiĝis sen eldondato la 129-paĝa traduko en Esperanton de ŝia verko Danai Vraïla. La romano, dividita en du grandajn *partojn*, rakontas la vivon de Danai en linia ordo de sia infanaĝo ĝis la nasko de sia bebo. Elektinte ĉioscian rakontanton, Patrinu sukcesas enpenetri la pensojn de ĉiuj roluloj. Ŝi lerte koherigas la tekston per ripetoj kaj aludoj al antaŭaj okazaĵoj en la romano, kaj ne malofte ŝi faras tion nerekte, envolvante la leganton en ludon, en komplicon kun la rakontanto. Tio favoras la uzon de humuro, kiun ŝi diskrete utiligas en priskriboj per citaĵoj, kun aldono de fajna sarkasmo danke al oksimoroj kaj troigoj. Aliflanke, ŝi majstre kapablas atingi klimakson laŭ gradacio de elementoj kun morna aŭ mistera konnotacio. La lingvo bezonus etan poluron, kvankam ĝia stato estas sufiĉe akceptebla. Ambaŭ libroj en Esperanto estas ilustritaj de la greka desegnisto Michalis Nikolinakos (1923-1994), famiĝinta kiel kinaktoro.

Despina Patrinu publikigis originalajn rakontojn en la revuo *Fonto*, kiel "La sorĉistino" (Patrinu 1980) kaj "Virnufaro" (Patrinu 1981), ĉi lasta kun malplia kvalito ol kutime ĉe ŝi. Krome, ŝi ankaŭ tradukis en Esperanton: en *Nova Esperanta Krestomatio* (Auld 1991) aperas

ŝia elgrekigo de poemo de Lorenzo Mavilis, kaj la volumo *Izolulo / Osamljenik* (Ŝtimec 1993) reaprigas tradukon ŝian el la kroata.

### **Enkela Xhamaj (1977—)**

En 1992 surprize aperis nova poetino. La publikon miris du faktoj, nome, ke ŝia lando estis Albanio, kiu ĝis la antaŭa jaro estis fermita al la cetera mondo, kaj ŝia frueco, ĉar Enkela Xhamaj havis nur dek kvin jarojn. Ŝi konatiĝis per unu sola libro: *Spektro*, eldonita de Albana Esperanto-Ligo. La verko arigas kvardek poemojn dividitajn en kvar partojn: "La mondo antaŭ miaj okuloj", "Mi songas", "Spektro de sentoj" kaj "Maltrankviligita dormo". En ĝiaj paĝoj la aŭtorino montriĝis tre matura en sia juneco kaj, kvankam ŝia esprimivo estus kelkloke polurinda, ŝia talento prezentiĝis promesplena. En sia recenzo Nikolaj Stepanov prave rimarkis la "riĉecon kaj abundecon de personoj, figuroj kaj temoj". Efektive, la uzado de komparoj, metaforoj, gradacioj kaj aliaj stilfiguroj, kombinita kun abolo de la tradicia versfarado konsistigis freŝan blovon en nian literaturon. Dum la unua duono de la 90aj jaroj ŝi publikigis la poemojn poste kolektitajn en *Spektro*, kaj ankaŭ novajn versaĵojn en revuoj kiel *Kontakto*, *Monato*, *Literatura Foiro*, *Israela Esperantisto*, *Brita Esperantisto*, *La Eta Gazeto* (organo de Triesta Esperanto-Asocio) kaj *Ruslanda Esperantisto*.

Enkela esploris ankaŭ la verkadon de mallongaj prozaĵoj. "Unufoje", aperinta en 1997 kaj adresita al juna legantaro, ŝokas pro sia eksplicita seksa lingvaĵo kaj decida pledo por libero kaj rompo de la konvenciaj ĝenraj roloj.

Kiam ŝi publikigis *Spektroj*, ŝi estis studentino de fremdlingva mezlernejo. Tie ŝi lernis la anglan kaj kompletigis siajn lingvokononajn per memstara studo de la itala kaj la germana. Tiu vojo portis la knabinon, kiu revis "fariĝi esperantologo", al universitata studado de Angla Lingvo kaj Literaturo kaj Germana Lingvo, kaj al reta mastriĝo pri Interkultura Komunikado. Krom la supre menciitaj lingvoj, ŝi nun ankaŭ parolas la francan kaj la hispanan. Poste ŝi instruis la anglan en fremdlingva centro kaj ĉe kelkaj aliaj edukaj ŝtataj kaj privataj institucioj. De preskaŭ dek jaroj ŝi laboras kiel oficiala tradukistino de la angla lingvo de la albana Ministerio pri Justico.

Ŝia literatura kreivo fruktis post ŝia esperanta debuto, sed nur en la albana: *Yje në shkretëtirë* (*Steloj en dezerto*, 1993), *Puthja e qenit* (*La hunda kiso*, rakontoj, 1998) kaj pluraj poemoj aperintaj en kolektivaj libroj kaj revuoj ĝis nun. Ŝi ankaŭ angligis kolekton de romaaj legendoj de Mina T. Qirici (*The lonesome prince*, 2002) kaj verkojn de la albanaj poetoj Milianov Kallupi (*Psherëtimë ere / Wind sighing*, 2005) kaj Petro Dudi (*Constellation*, 2008). Samtempe ŝi faras vastan ĵurnalistan laboron kiel esploristo pri historiaj temoj kaj kunordiganto de publikaĵoj.

Sed ĉu restas trajtoj de ŝiaj unuaj esperantaj paŝoj en la postaj albanlingvaj poemoj? Certe jes – konstanto en ŝia poezio estas duflankeco de la vivo, nekontenteco pri la realo, kiu kelkfoje turniĝas en espero pri futuro. Tio konkretiĝis sub la formo de gravedo jam en *Spektroj* (en la poemo "Estonta patrino") kaj refontis poste en la eksterordinara, impresa poemo "Fetusit tim që do të lindë" ("Mia naskiĝonta feti"). La elementoj de la naturo, veraj simboloj pozitivaj (cervo, luno, folioj, pomoj) aŭ negativaj (serpentoj, testudoj) en la kosmologio de la plenkreska Enkela estas parte spureblaj en *Spektroj*, kaj la mitologiaj aludoj (Meduza, Eroso, Prometeo) plu

vivas nuntempe en fortopenaj bildoj (*Ciklopo akvumas intesto / la varman teron*<sup>7</sup>, en la poemo "Carpe diem"). Alia difina trajto de ŝia tiama kaj nuna poezio, tratempa akso ĝin unueciganta, estas la nekompreneblo de aliuloj, al kiuj ŝi turnas rekte, per krioj, donante al la versaĵoj grandan intenson.

Nuntempe Enkela ankoraŭ tenas retan kontakton kun kelkaj albanaj esperantistoj, kaj bonstate konservas la lingvon. La poetino, kiu surprizis nian literaturon, kiu avido legis Kalocsay kaj havis amikajn rilatojn kun William Auld kaj Marjorie Boulton, bone memoras tiun periodon de sia vivo: "Mi estis adoleska sed plena de vivo kaj pasio. Estis belega periodo."<sup>8</sup>

### **Sara Larbar (1956 —)**

Sara Larbar estas la pseŭdonimo de Lilia Ledon da Silva, naskiĝinta en 1956 en la urbo Pelotas (ŝtato Rio Grande do Sul). En 1960 ŝia familio translokiĝis al San-Paŭlo. Ŝiaj gepatroj, Symilde Ledon (german-devena brazilano, naskiĝinta Schenk) kaj Gilbert René Ledon (franco) estis motoroj de la san-paŭla, kaj ĝenerale de la brazila movado, dum multaj jaroj. Ili pereis en trafik-akcidento en 2003. Hejme ili uzis Esperanton, kaj tial Lilia estis la unua verkisto de la esperanta literaturo denaske parolanta nian lingvon. En intervjuo farita en 1993 de Givanildo Costa (1993) en E-renkontiĝo de Rio-de-Ĵaneiro Symilde, la patrino, klarigas pri tio, kiel ŝi kaj Gilbert konatiĝis kiel korespondamikoj kaj tuj geedziĝis, kiam Gilbert alvenis en Brazilon. Ŝi donas tre valorajn informojn pri la familia edukado, kiuj povas helpi nin kompreni la etoson de la unuaj jaroj de Lilia:

Ni nur parolis esperante dum nia edziĝo-epoko, kaj ni jam estas kune de kvardek tri jaroj, kaj daŭre uzante esperanton. [...]Do ni havis tri infanojn, kaj kiam ili naskiĝis ni faris la jenon: mia edzo parolis al ili nur en esperanto, mi parolis nur la portugalan, por ke ili konu la lingvon de la lando, kaj ili aŭdis la gepatrojn paroli ĉiutage en esperanto.[...] [Ni havis] du filinojn kaj unu filo. [...] Ili estas esperantistoj anime, ili havas la internaciecan senton. Ili ne partoprenas la movadon, ili parolas, skribas kaj legas perfekte, kaj kiam ni faras kunsidojn, renkontiĝojn, ili kunhelpas nin.

Krom ŝiaj kontribuoj por revuoj kaj tradukoj<sup>9</sup> ŝi famiĝis pro la romano *Karuseloj* (1987), eldonita de sia patro, kun enkonduko fontinta el lia plumo. Diversaj estis la reagoj al tiu ŝia unua kaj lasta romano. Rejna de Jong, en sia recenzo por *Esperanto*, laŭdas la sukan lingvouzon, kun fakterminoj, poeziaj bildoj kaj priskriboj, kaj samtempe sciigas la legonton pri tio, kion ŝi nomas "speciala procedo". Ŝi aludas la apartan strukturon de la romano, en kiu vivoj de virinoj interplektiĝas tiel senaverte, ke oni devas streĉe atenti por kompreni.

Ĝuste tiu aparteco estiĝis la kerno de la kritikoj de aliaj du recenzistoj: dum Paul Thorsen (1989) asertis, ke "denove kaj denove la vojperdinta leganto ĝene devas peni por identigi, kiu el la karuselantaj li/ŝi/ili fakte revas, dialogas, ekstazas", Gerrit Berveling titolis sian recenzon en *Fonto* "Bona ideo sed tro mallerte plenumita". Ĉi tie ni ne forgesu, ke *Fonto*

---

<sup>7</sup> Originale en la albana.

<sup>8</sup> El interparolo kun ŝi.

<sup>9</sup> Kiel ekzemple la esperantigo, kunlabore kun ŝiaj gepatroj, de *Satana Anĝelo: traduko de la franc- kaj portugallingvaj ĉapitroj el la originalo* (SAT, 1984), libro originale verkita de ŝia patro.

estis revuo eldonita en la lando de nia verkistino, tial legita de multaj brazilaj esperantistoj bone konantaj la familio Ledon. Ambaŭ recenzistoj konsilas al la aŭtorino verki pli simple kaj orde.

Krom la distieaj komentoj pri la lingvo de la aŭtorino, kelkaj celantaj, laŭ la kutimo de la esperanta recencado, elsarki neperfektaĵojn, oni sentas la mankon de alia perspektivo. Kiel Rejna de Jong sugestis, eblas vidi en la verko majstran uzon de la lingvo, plenan de esprimivo. Cetere, neniu menciis la signifon de revolucia verko, kiu breĉis novan, maturan vojon en la esperanta prozo.

Rilate traktadon al verkistinoj fare de kelkaj viraj recenzistoj, valoras la penon rememori la vortojn de Sten Johansson:

Kolektante recenzojn por la ttt-ejo Originala Literaturo Esperanta (<http://www.geocities.com/origlit/>) mi ofte trovis malestimajn aŭ malseriozajn reagojn de viraj recenzantoj, kiam iu virino ja “prezentis sin“, ne per kovrilpaĝa foto, sed en formo de romano. Tio trafis kaj konatajn aŭtorojn kiel Spomenka Ŝtimec kaj malpli famajn, kiel Sabira Ståhlberg, Sara Larbar kaj Manjo Austin. Recenzanto, kiu ne traktas la recenzatan verkon serioze, ja malestimas ne nur la verkiston, sed krome la legantojn kaj sian propran rolon.

Sten Johansson mem (recenzo de *Karuseloj*) verkis alian tekston multe pli afablan. “Estas nedubeble, ke grava verka talento nestas en la nekonata verkistino”, li diris.

Oni kutime asertas (ekzemple, en Johansson: artikolo en OLE), ke Lilia Ledon kabeis post la publikigo de *Karuseloj* en 1987. Oni povus imagi, ke la ne tro favoraj recenzoj helpis al ŝi alpreni tiun decidon. Efektive, ŝi aktivadis en la movado ĝis ili aperis. Inter la 6a kaj 13a de aŭgusto 1988 disvolviĝis en la brazila urbo Campos do Jordão, en San-Paŭlo, la Internacia Kongreso de SAT. En ĝi Lilia prelegis pri la konatiĝo kun Esperanto de unu el la plej gravaj aŭtoroj de la brazila literaturo: Guimarães Rosa. Kongresano ĉeestinta parton de la prezento de nia aŭtorino ĵetas al ni lumon pri tiu ŝlosila parto de ŝia vivo (Sartorato 2005?):

Interalie ŝi diris ke ŝia esploro pri la temo ankoraŭ ne estas kompleta, kaj ankaŭ kuraĝigis aliulojn same agi.

Pasis kelkaj jaroj. Lilian Ledon malsaniĝis kaj ne daŭrigis sian esploron<sup>10</sup>.

Tie perdiĝas la spuroj de Lilia Ledon. Laŭ indikoj de la Esperanto-klubo de San-Paŭlo, junaj esperantistoj ne konas ŝin, kaj la pli aĝaj ne scias, kie ŝi estas. Tamen mi sukcesis kontakti ŝin per aliaj rimedoj; ŝi tiel skizis ĝisdatigon de sia aktuala vivo:

Nuntempe mi vivas en plena izoliteco, nenifarado kaj speco de deprimiĝo (tiaj periodoj estas sufiĉe oftaj ĉe mi, tio estas kvazaŭ parto de mia personeco – seniluziĝo rilate homan sintenon, agadojn...), kio igas min malinteresiĝi pri kio ajn, ĉefe rilate mian foran pasintecon. Ankaŭ jam delonge mi ne plu uzas E-on, do bonvolu pardoni erarojn k malprecizecojn.

Pri ŝia verkado ĝenerale, la publikigo de *Karuseloj* kaj la graveco, kiun ŝi donis al la kritikoj, ŝi deklaris:

Mi ĉesis eĉ verki artikolojn (por la movado kaj por akademias traserĉoj, ĉar mi ankaŭ ekŝiĝis de mia universitato). San- kaj spirito-stato gvidas miajn elektojn. Mia rilato al la movado estas

---

<sup>10</sup> Originale en la portugala.

kompleksa (denaska, engaĝita ĝisoste, senluziigita ktp). Mi eĉ ne kolektis la reagojn al mia libro [...] kaj mi certe ne atendis laŭdojn. Mia stilo neniam estis *populara*. Mi verkis *Karuseloj* preskaŭ terapi-cele [...].

Post ŝia laborado en la universitato kiel instruisto de la franca, nuntempe ŝi “iom instruas la francan kaj iom tradukas”<sup>11</sup>, kvankam ŝi devas alfronti seriozajn san-problemojn. Tiel, izolita kaj de esperantistoj kaj, kiel ŝi humure diris, ankaŭ de "normalaj homoj", ŝia vivo stagnas.

Post tiu unua kontakto venis aliaj, kaj ankaŭ ŝia malfermo al esperantistoj en sociaj retejoj. Dotita per akra observemo kaj kun tre vasta kulturo, ŝi denove entreprenas produktadon de interesaj tekstoj kaj senpage proponas ilustritan, iom reviziitan bit-eldonon de *Karuseloj*.

## Konklude

Kompare kun aliaj literaturaj sistemoj, en la esperanta beletra ekzistas kondiĉoj, kiel la geografia diseco, kiuj malfaciligas la konstruon de aŭtora bildo, kaj individua kaj kolektiva, por komune kodigi sian esprimilon. Al tiu manko de sama projekto aldonendas la genra baro; tial, kiam virino verkas unuapersona, kiel subjekto, renversante la tradician ordon, restas al ŝi nur iĝi snajperino kaj malfermi tekstan spacon plenan je novaj ebloj, kiel en la kazoj de Sara Larbar kaj Despina Patrinu. La rezigno je la modelo de vira literaturo ricevas pagon samnivelan kiel la aŭdaco kaj kvalito de la koncernaj verko-mitraloj: akrajn kritikojn aŭ maljustan neatenton. Por elstarigi siajn voĉojn kiel sendependaj, Patrinu elektis memeldonadon, Larbar eldonis ĉe Fonto sen la nomo de la eldonejo kaj Albana Esperanto-Ligo eldonis la poemojn de Xhamaj en formo de eta, modesta broŝuro. Tiuj solvoj enhavas kerne sian kontraŭefikon: ili pli malfacile eniras la kutimajn distribu-kanalojn, ne profitas el reklamado de eldonejoj kaj ne ebligas facilajn republikigojn. Tio nevidebligas la novajn voĉojn, dampante ilin per forgeso. Estas tasko fareda de la literatura kritiko restaŭri ilin, redonante al la beletra historio perspektivon el la virina alieco.

## Referencoj

- Andrikopoulos, Giannis. 1992. *I patrini logotekhnia: I yinekia patrini pesografia*. Aiyio.  
Menciita en: *O pharos tis Alexandropolis*. 22. Aprilo-majo-junio 2007. Ayia Paraskevi.  
Konsultebla ĉe: [http://alexandroupolites.gr/wp-content/uploads/bsk-pdf-manager/5\\_22\\_FAROS.PDF](http://alexandroupolites.gr/wp-content/uploads/bsk-pdf-manager/5_22_FAROS.PDF)
- 1993. Ta gegonota kai ta zitimata. Despina Patrinou. *Nea Estia* 1589. 134.
- Auld, William(red.). 1991. *Nova Esperanta Krestomatia*. Rotterdam: UEA. 460.

---

<sup>11</sup> Kelkaj lastaj tradukoj el la franca de Lilia Ledon estas: *Caminhar, uma filosofia*, de Frédéric Gros (2009); *Mentira romântica e verdade romanesca*, de René Girard (2009); *A conversão da arte*, de René Girard (2011); *A vida intelectual*, de A.-D. Sertillanges (2011); *Bresson ou O ato puro das metamorfoses*, de Jean Sémolué (2011); *Quando começarem a acontecer essas coisas*, de René Girard (2011); *O tempo das catástrofes*, de Jean-Pierre Dupuy (2011); *Considerações sobre a educação seguidas de Pedagogia infantil*, de Alain (2012); *Treinamento interior taoista: tratado de alquimia e fisiologia*, de Zhao Bichen (2012), ĉiam ĉe la eldonejo É Realizações.

- Benczik, Vilmos. 1979. *Baza literatura krestomatia*. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio. 5.
- Berveling, Gerrit. 1991. Bona ideo, sed mallerte plenumita. *Fonto*.122. Konsultebla ĉe: [esperanto.net/literaturo/fo/karuselrec.html](http://esperanto.net/literaturo/fo/karuselrec.html)
- Camacho, Jorge. 2003. Ne chio verda estas esmeralda. *Esperanto* 96/2:38-39.
- Colaizzi, Giulia. 1990. Feminismo y teoría del discurso. Razones para un debate. En: Colaizzi, Giulia (red.). *Feminismo y teoría del discurso*. Madrid: Cátedra. 13-28.
- Conterno, Clelia. 1977 [recenzo pri *Homa animo*]. *Literatura Foiro* 46.
- Costa, Givanildo. 1993. Intervjuo al Symilde Ledon (sondokumento). Konsultebla ĉe: <http://esperanto.org.br/dok/diversaj/intervjuoSymildeLedon.mp3>
- De Jong, Rejna.1989. Amo kaj arto surprizas. 1989. *Esperanto*. Konsultebla ĉe: [esperanto.net/literaturo/uea/karuselrec.html](http://esperanto.net/literaturo/uea/karuselrec.html)
- De Mesquita Silva, Luciana. 2010. Diáspora e identidade cultural na literatura de Grace Nichols. En: *Raído*, Dourados, MS, v. 4, n. 7. 105-112.
- Dufour-Maître, Myriam. 2011. "Oublier les *Précieuses* ? Critique d'une catégorie critique (1999-2009)". En: Martine Reid (dir.). *Les femmes dans la critique et l'histoire littéraire*. Paris: Éditions Honoré Champion. 53.
- Fouriotis, Angelos. Pediá tou Seth kai tou Káin [recenzo]. *Akropolis*. 17-10-1978.
- Johansson, Sten (recenzo de *Karuseloj*). Vulkana debuto. Konsultebla ĉe: [esperanto.net/literaturo/roman/libr/karuselrec.html](http://esperanto.net/literaturo/roman/libr/karuselrec.html)
- Johansson, Sten. 2004. Seksa kaj aliaj ismoj. *La Ondo de Esperanto* 4 (114). Konsultebla ĉe: [Esperanto.org/Ondo/Ondo/114-lode.htm](http://Esperanto.org/Ondo/Ondo/114-lode.htm)
- Larbar, Sara. 1987. *Karuseloj*. Chapecó.
- Minnaja, Carlo, kaj Silber, Giorgio. 2015. *Historio de la esperanta literaturo*. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro.
- Patrinu, Despina. 1976. *Homa animo*. Ateno: memeldono.
- [1979]. *Danai Vraila*. Ateno: memeldono.
- 1980. La sorchistino. *Fonto* 1.
- 1981. Virnufaro. *Fonto* 8.
- Pleadin, Josip. 2006. *Ordeno de Verda Plumo. Leksikono pri Esperantlingvaj Verkistoj*. Đurđevac: Grafokom.
- Sartorato, Aloisio. 2005? Guimarães Rosa e o esperanto. Konsultebla ĉe: [esperanto.brazilo.org/wp2/conheca/opiniones/guimaraes-rosa/](http://esperanto.brazilo.org/wp2/conheca/opiniones/guimaraes-rosa/)
- Štimec, Spomenka (red). 1993. *Izolulo / Osamljenik*. Zagreb: IKS.
- Sutton, Geoffrey. 2008. *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*. New York: Mondial.
- Thorsen, Paul. 1989. Karuseloj.... *Literatura Foiro*. 118. Alirebla ĉe: [esperanto.net/literatura/lf/karuselrec.html](http://esperanto.net/literatura/lf/karuselrec.html)
- Vasilikos, Vasilis. 2011. *I digisi tou Iasona*. Athina: Govosti. 11-12.
- Vilavedra, Dolores. 2007. Unha achega ao discurso narrativo de autoría feminina. En: *Madrygal*, 10. 145-151.
- Vravia ton "Dodeka" (1951-1966). Konsultebla ĉe: <http://www.ekebi.gr/frontoffice/portal.asp?cpage=RESOURCE&cresc=3692&cnode=573>
- Xhamaj, Enkela. 1992. *Spektroj*. Albana Esperanto-Ligo.
- 1992b. El *Spektro*. *Kontakto* 162.
- 1993. Enkela, muzido el Albanio. *Kontakto* 133.
- 1995. Vi. *Kontakto* 148.
- 1997. Unufoje. *Kontakto* 162.



